




DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Abono en Eŭropo, 1992 : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF

Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS

Pêk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)



**65-a
KONGRESO
DE S.A.T.**

**EN KAUNAS
LITOVIO**

05.08.1992

15.08.1992

nia debato

PAĈJO, KIO ESTAS TIO ?
(komenco en L:97)

J.G. :

De pli ol jarcento komunismo estis idealo de intelektuloj kaj laboristoj. Tiu doktrino devus permesi la starigon de socio, kie ne plu ekzistus la ekspluatado de homoj fare de aliaj homoj. Por atingi tiun celon la rimedo devus esti la lukto de la laborista klaso kontraŭ la kapitalismo ĝis la forigo de tiu lasta sistemo. La Rusa Revolucio ŝajnis la plenumo de tiu idealo : povo de la laboristaro, forigo de la kapitalismaj strukturoj, kolektivigado de la bienoj. Multaj intelektuloj kaj laboristoj de la tuta mondo kredis, ke tie konstruiĝas la socialismo, (unua etapo al komunismo) en la patrujo de la laboristoj. Naskiĝis la mito, kiu blindigis (krom kelkaj esceptoj) la vizitantojn, la teoriulojn, sed la "reala socialismo" fariĝis politika diktaturo kaj ekonomia malsukceso.

La sistemo eksplodis pro siaj internaj kontraŭdiroj, feliĉe sen tro da sangaj bataloj. Tiu eksplodo estis tiom rapida, ke ĝi ne povis esti antaŭvidita. Tio malstabiligis la regantajn strukturojn kaj naskis naciismojn, religiajn integristojn. La tieaj popoloj estis logitaj de la Okcidenta vivnivelo, sed la drasta leĝo de la Merkato rapide seniluziigis ilin : apero de la senlaboreco, fulma kreskado de la prezoj kompare al la salajroj... Tiu situacio povas konsistigi favoran grundon por nova diktaturo aŭ civila milito.

Ankaŭ en niaj riĉaj landoj estas seniluziigo pro la malsukceso de la komunismo kiel idealo, kaj pro la neplenumado de la promesoj faritaj de la diversaj registaroj por solvi la krizon de la nia "liberala socio". La senlaboreco ĉiam plu kreskas, la gejun-

65-a KONGRESO DE S.A.T. 05.08.1992 - 15.08.1992 EN KAUNAS - LITOVIO

ORGANIZA KONGRES-KOMITATO:
Prezidanto: Povilas JEGOROVAS
Sekretario: Rima SKUDZINSKIENE
Kasisto: Viktoras BANULAITIS

Aliĝilon bonvolu sendi al la kontaktadreso (tuj, kiuj pagas tra SAT-Centro, bv. aldoni kopion de aliĝilo).

Aliĝantoj	Kotizkategorio A - en F.F.			Kotizkategorio B - en Rubloj			Kotizkategorio C - en Rubloj		
	Ĝis 1.3.92	Ĝis 1.5.92	Poste	Ĝis 1.3.92	Ĝis 1.5.92	Poste	Ĝis 1.3.92	Ĝis 1.5.92	Poste
SAT-membro	250,00	300,00	350,00	50,00	55,00	60,00	30,00	40,00	50,00
SAT-gejndzoj	400,00	450,00	500,00	70,00	80,00	90,00	50,00	60,00	70,00
SAT-gejunuloj (15-25 j.)	125,00	150,00	175,00	25,00	30,00	35,00	45,00	25,00	35,00
Gastoj	350,00	400,00	450,00	65,00	70,00	75,00	40,00	50,00	60,00
Gast-gejndzoj	500,00	600,00	700,00	100,00	110,00	120,00	60,00	80,00	100,00
Gast-gejunuloj (15-25 j.)	175,00	200,00	225,00	35,00	40,00	45,00	20,00	30,00	40,00

RESTADKOSTOJ	Kategorio A - en FF	Kategorio B - en Rubloj	Kategorio C - en Rubloj
Junulgastejo	1500,00	300,00	200,00
Plurita ĉambro	2000,00	350,00	250,00
Unufla ĉambro	2500,00	400,00	300,00

Kategorio A - en F.F.: Kongresanoj el pagipovaj landoj - pagu la kotizon al Parizo, al poŝtkonto de SAT, n° 1234-22 K. Paris aŭ per karto "VISA" (neire indiki, per legeblaj literoj, la numeron de via karto kaj ĝian validindadon).

Kategorio B - en Rubloj: Kongresanoj el eksocialismaj Eŭropaj landoj: kaj aliaj meritaĵ landoj, pagu surloke, veninte al la kongreso, laŭ dato de via aliĝilo, ricevia de Organiza kongreskomitato.

Kategorio C - en Rubloj: Kongresanoj el Sovetunio kaj ĝiaj estinaj kaj nunaj respublikoj sendu la monon al la kasisto de la kongreso, k-do BANULAITIS Viktoras, Zigmoo, 235800 Klaŭpeda. ab.k. 168, Litovio.

Aliĝilon petu de : SAT, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIS

uloj malesperas en la ĉirkaŭurboj, ktp. Tiu situacio jam estigas la renaskiĝon de la ideoj kaj partioj, kiuj laŭdegas la naciismon, la timon kontraŭ la enmigrintoj. Tiu amasa movado volas forigi la leĝojn por la libera aborto, restarigi la mortpunon, ktp. Ankaŭ la religia integriĝo kunigas la malkontentulojn.

Kiu solvo por haltigi tion? Laŭ mi, nur starigi mondskala alian dispartigon de la laboro kaj de la vivrimedoj inter la homoj, respektante samtempe la naturan medion. Sed kiamaniere atingi tiun celon fronte al individuaj kaj sociaj interesoj, kiuj profitas de la nuna situacio?

Nicole Déjean :

Kio estas tio?... Laŭ mi, ne revolucio, nek nova mondo, nek fino de la Historio... sed ruiniĝo, fiasko de politika, socia sistemo, la komunisma. Tiu falo ne signifas, ke la kapitalisma sistemo pravos, venkas. Estas grave, urĝe kompreni kial, serĉi la veron, eĉ dolorigan.

Certe la gazetoj, ĉu skribaj, ĉu televidaj, ne blevis, ne blovas neŭtralan kaj kompateman "venton". Strange, mi aŭdis nenium eminentan komuniston laŭte, vigle kontraŭstari, analizi la situacion, defendi siajn ideojn...

La reago de Pako estas tiu de idealista partiano, kiu sincere klopodis, strebis, agadis, batalis, suferis, esperis por starigi pli bonan, pli justan mondon kaj kiu travivas frakason de sia idealo... Same suferas, indignas, konsterniĝas, elreviĝas tiuj, kiuj sin fordonas al io, al iu, kiu ilin perfidas, iĝas fremda, malamika. Estas vera premsonĝo! Sed tiackaze ne temas pri individua problemo, tiu renverso trafas la politikajn partiojn, ne nur la komunistajn, la sindikatojn, multajn asociojn kaj pli precize ĉiujn civitanojn. Iom post iom la konsekvencojn ni devos elteni, regi.

Necesas iĝi modesta, provi aŭskulti, rigardi, observi, kompreni ne nur laŭ siaj propraj referencoj, sia lingva esprimo, siaj "okulvitroj", eĉ se oni sincere opinias esti klarvida, racia, tclerema. Necesas, aŭ estus bone sin

loki en la Teran historion, en la homaran historion.

Ne, la "Historio" ne estas finita, ne estas nova mondo, estas nuntempaj malordoj, klopodoj al ordo. Nia planedo travivas mutacion. La homoj ne plu mastras la teruran kaj mirindan potencon, kiun donas la pli kaj pli rapidaj progresoj de la tekniko, de la sciencoj. Kaj ni politike, socie, mense plu funkcias per kadukiĝantaj strukturoj, sistemoj, teorioj. Ne estas venkintoj : Estas tiom da mizero, eksplodaj situacioj, tiom da malfeliĉuloj, maljustaĵoj, tiom da "alienuloj", ĉie en la mondo!

Tute prava kaj plej valora estas por mi la rimarko de Pako : "La respondoj estis malĝustaj, sed la demandoj plu staras." Certe estas aliaj vojoj alireblaj ol ekspluatado. Sed ne povas esti por ĉiam taŭgaj respondoj, nek universala solvo al la homaraj problemoj.

Vivo estas movo, vivo entenas morton kaj naskiĝon. Mi aldonas al la rimarko de Pako : Homaranima idealo plu valoras kaj plu restas starigota.

Suzanne :

Estas tute komprenebla la sufero de la bazaj aktivuloj pro la grava renversiĝo, kiu okazas. Des pli ke la plimulto da ili ne scivolis pri la regado de la bolŝevismo, kies "sukceso" estis konservi la povon kontraŭ la rusa proletaro, kaj samtempe mistifiki la internacian proletaron koncerne la internan reĝimon, kiu estis terora reĝimo deveninta de la revolucia malsukceso - 1917-1921 - de la proleta ŝtato. Ĝi uzurpis la vorton "komunismo", alproprigis al si ties agitvortojn kaj simbolojn por mistifiki kaj subpremi la internacian laboristan klason.

La "fino de la Historio" laŭdire. Ne. La Historio ripetiĝas en doloro. La mizero neniam estis fatalaĵo. Se fiaskis la projekto de ekonomia kaj socia egaleco de marksismo-leninismo, tio ne signifas, ke la liberala ekonomio estas feliĉa alternativo. Tute male : la ciferoj memorigas tion, kaj ne nur la ciferoj!

Pruvi ke oni kontraŭstaras la kapitalismon ne estas nova ; sed pro la konjunkturo urĝas ekpripensi por ke ĝi fine neniĝu. Nenio eblos sen radikala transformado. La nuna renversiĝo devus motivigi la "orfojn" pripensi socialisme-liberecanan mondon. Tia ekonomio bazita sur efektiva egaleco estas ebla, malgraŭ la kompleks-

eco de la nuntempaj socioj. Iu ekonomio ne plu estos ekonomia akumulado nek profitdona; ĝi nepre estos disdona. De nun eblas starigi tian organizon celantan la justan disdonon de la riĉaĵoj. Tio ne fontas el utopio sed de politika volo. Evidente, sen tia politika volo ĝi ne estas realigebla. En tio ja la marksismo fiaskis. En tio ja eblas alternativo al kapitalismo, nur se la politika bazo enhavas tiun ekonomian klopodadon malfacilan, bazitan sur senpera memregado, sen ajna hierarkio inter ĉiuj sociaj parteneroj.

Por la tempo de kazerna komunismo neniiganta la individuon! Lasu lokon al la senpera regado de ekonomio. Konstatu la fuŝojn, la maljustaĵojn de la merkato-ekonomio.

Ne sufiĉas forigi la esprimon "klasbatalo" el sia vortaro por forigi ĝian ekziston.

Tam MALRAUX antaŭdiris: "La 21-a jarcento estos religia, aŭ ĝi ne estos". Eble por malproksimiĝi de la komunistoj, kun kiuj antaŭe li iom interrilatis. Antaŭ kelkaj jaroj tia anonco estus ridinda, sed, ho ve! hodiaŭ ni konstatu la retroiron de la laikeco kaj de la ateismo. La religiaj integristoj estas ĉie. Ne plu estas la epoko de la maldekstraj katolikoj kaj de iuj progresemaj muzulmanoj pli-malpli marksismemaj... Jen tiu religia vekigo hieraŭ en Irano per ties iradoj de virinoj kiuj surmetis sian vualon kaj aplikas la islaman leĝon, kiu ĝis nun estis aplikata, koncerne la precipon, nur en la arabia duoninsulo. De tiam okazis eksplodo. La katolika Eklezio senprokraste, per la voĉo de Paŭlo la Dua, denuncas la herezulojn, strebas malestimegi la malpian mondon nian. Same kiel en muzulmana tero, la malpieco pasas tra la virinoj - el la plej bonaj celoj - por la mizoginaj religuloj.

Poste la klerikalo-faŝismo gvidos la virojn sur la vojo de sia vero. Tio signifas, ke la socio fakte estas endanĝerigata. Sed ankoraŭ estas tempo por reagi!

Rafael MARGALEF:

ALIAJ VOJOJ

Pako, Castiau, Etge, Garolo, Tereza, Ĵanseb, O.P. kaj Deker pruvas ĉefe sian maltrankvilon antaŭ la nuna situacio post la disfalo de la orienta komunismo.

Ili pravas, ĉar ni ne estus saĝaj, se ni konformigus al sendungeco kaj al aliaj maljustaĵoj. Sed oni forgesas, ke

sen unuiĝo ni nenion povas fari. Kaj unuiĝo povas esti nur en toleremo, ĉar estas neeble, ke ĉiuj opiniu same. Pako pravas, kiam demandas pri tria vojo. Ankaŭ Castiau, kiam asertas ke ni ĉiuj individue respondecas pri tia fisituacio kaj ke ekzistas alia vojo. (Mi aldonas, ke eble ekzistas pluraj). Samtempe, Pako kaj Etge, laŭ mia opinio, malkovras imagajn malamikojn. Pako, la nacian amon kaj la katolikajn pastrojn, do la katolikecon, dum Etge, la Japanojn kaj la lingvan plurecon.

Kiel la homoj kuraĝos GLOBE iniciati pri iu ajn solvo (Garolo), se ni jam ekskludas la katolikojn, la naciistojn kaj la Japanojn?

Niaj ĉefaj malamikoj estas nia neinteligenteco kaj la totalismaj sistemoj. Demokratio estas vojo, kiu pace permesas politikajn ŝanĝojn. Se ni ne kapablas utiligi ĝin, la kulpo estas nia.

Ĉiuj religioj kaj ideologioj ne estas danageraj; mi eĉ diros, ke ili estas bonaj, kondiĉe ke ili estu toleremaj kaj demokratiaj. Se orienteŭropa komunismo disfalis, tio estas pro tio ke ĝi estis nek tolerema nek demokratia.

Ĉiuj popoloj kaj iliaj lingvoj estas la komuna haveco de la tuta homaro. Neniu rajtas malaperigi iun popolon aŭ lingvon.

La lingva plureco ne estas militkaŭzo. En la hispana Respubliko ĉiuj parolis la kastilian lingvon, tamen estis intercivitana milito. Kaj bedaŭrinde ne estis ĉi tiu respubliko, kiu malkovris tiun ĉi specon de milito; aliaj popoloj konis kaj ankoraŭ konas ĝin. Dume, en Svislando, estas pluraj egalrajtaj lingvoj kaj religioj, kaj delonge estas nenia intercivitana milito.

"Ĉiu homo respondecas..." diras Tereza, interalie.

"... socioj pli justaj, pli ekologiaj, pli pacaj, pli altigaj por la homo... kaj ne forgesu, ke ili devas esti ankaŭ dezirataj de ĉiuj, ne truditaj de iuj al la aliaj", diras Ĵanseb. Mi aldonas, ke nur diversismo povas ebligi, ke neniu solvo estu truita, ĉar ĝi permesas la kunvivadon inter la diversaj ideologioj kaj inter la homoj, kiuj defendas ĉiun.

Modesto traŭe pritraktas pri neutilo de kristanismo por la plibonigo de la homara stato. Mi, same opinias, kaj

neniu tolerema kristano povas kolerigi pri tiu artikolo.

Al la artikolo de Deker mi aldonas, ke bona mastrumado de ekonomio ne estas ebla sen bona demokratio.

Sed ne forgesu, ke ni ne estos fratemaj, se ni ne el-lernas esti feliĉaj vidante ke ankaŭ aliaj homoj estas feliĉaj travivante ian religion aŭ/kaj ian ekonomian socion, kiu ne kontentigas nin.

IOMETE PLI PRI NASRUDINO

Sur la paĝoj de L197 mia amiko, magistro Adán Hrynkievicz, pseŭdonime "Ergoto de Bonaero", publikigis spritaĵojn (vere, subtilaĵojn) de la fama legenda turka saĝulo Ĥoĵo Nasrudino (Khwaja Nasruddin, 1350-1399). Tamen al tio, kion li publikigis, mi volas aldoni alian spritaĵon; kaj jen ĝi.

La reĝo de la loko, kie loĝis Nasrudino plendis pro tio, ke liaj regatoj kutimadis senhonte mensogi. Tial li ordonis, ke ĉiu eniranto en la citadelo, ĉe la enirejo, estu demandata, kaj se li mensogis, li estu tuj pendigita.

Kiam ĉe la aŭroro malfermiĝis la pordo de la citadelo, la unua, kiu eniris, estis Nasrudino.

Li estis haltigita de la oficiro, kiu komandis la soldatojn, kiuj tie deĵoris. La oficiro mansignis al la pendigilo instalita apud la enirpordo, kaj demandis:

- Kien vi iras? - kaj gravtone aldonis: Diru la veron, kontraŭe vi estos pendigita.

- Mi venas, respondis trankvile Nasrudino, por esti pendigita.

- Mi ne kredas tion.

- Nu bone, se mi mensogis pendigu min.

- Se tion mi farus, via mensogo fariĝus vero.

- Ĝuste vi parolis.

Oni diras pri Nasrudino ankaŭ ke li gajnis la admiron kaj simpatio de la fama konkerinto (vere, fimortigisto) Tamerlano (1336-1405). Danke al ĝi tiu admiro kaj simpatio al Nasrudino, Tamerlano pardonis la vivon kaj lasis la propraĵojn al multaj el la samlandanoj de la saĝulo.

Afablejn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

A. Lopez Luna



VORTOJ DE MALJUNULO

valo

FANTAZIO EN UNIFORMO

Unua parto: Kiam mi estis oficiro

De la unua de Aprilo 1922 ĝis la 30a de Aprilo 1923 mi estis leŭtenanto en la 22a regimento de Tuniziaj Tiraljoroj sidanta en Euskirchen, proksime de Kolonjo kaj Bonn.

Alveninte kun tritaga prokrasto, mi estis rigardata preskaŭ kiel diletanto. Tamen la regimentestro Kolonelo B. akceptis min afable. Li prezentis min al mia senpera superulo Kapitano M., dudeknaŭjara, kun kiu mi tuj simpatis. Je aperitivo en la oficirkazino la oficiroj akceptis min tre kore.

Kelkan tempon poste unu el miaj superuloj, Komandanto (majoro) T. diris en rondo de altgraduloj: "Sinjoro LAVAL estas bona oficiro, tre bona oficiro... sed li ne estas militisto." Kapitano M. aldonis: "Kaj rimarku, li estas tre inteligenta."

Mi lasas al li la respondecon pri tiu flata apreco. Mi notas nur, ke li ne diris: "Tamen". Mi konkludas, ke por li, kiel por mi, "militista" kaj "inteligenta" ne estas sinonimaj. Sed ni revenu al la vorto de la majoro. Ĝi estas nur ŝajne paradoksa: mi ja akurate plenumis miajn taskojn de malaltgrada oficiro, sed mi havis elastajn rilatojn kun la disciplino, "kiu faras la ĉefan forton de la armeoj".

Iam mi komandis manovron al mia sekeio sur la korto de la kazerno. Kolonelo B., hazarde pasante, rimarkis ke unu el miaj tiraljoroj tre mallerte manovris. Li faris al mi la rimarkon kaj ordonis ke mi

punu tiun fuŝulon. Mi kunklakigis la kalkanumojn : "Jes, mia kolonelo", sed la morgaŭon en mia taga raporto ne aperis iu mencio pri iu puno. Tio estis rekta malobeo kaj meritigis sankcion, nome punon al mi mem. Sed la kolonelo ŝajne jam forgesis pri tiu negrava afereto.

Dum dek tri monatoj mi neniam punis iun soldaton. Certe tio estis rimarkita, sed ne komentita.

Mi ankaŭ ne batis, sed tio ne estis manko al la disciplino, ĉar en la franca armeo batoj estas malpermesitaj. Tamen ili estis tre kutimaj en ĉiuj koloniaj trupoj. "Kredu min, diris la profesiaj oficiroj : Ili, la "araboj", la "indiĝenoj", komprenas nur batojn. Batu ilin, ili obeos."

Mi ne sekvis la konsilon. Kaj baldaŭ poste la konsilintoj mire konstatis la efikojn de mia neperforta komandmetodo.

"Kiel do vi faras?"

- Mi simple traktas homojn kiel homojn."

Sed tio estis ekster ilia kompreno. Ĉu "indiĝenoj" estas homoj? Tamen ili estis bonkoraj, sed la rutino estis pli forta ol la bonaj sentoj.

Iun vesperon je la dudekdua en kafejo de tirajloroj ricevintaj elirpermeson ĝis noktomezo, jam drinkis kaj komencis kvereli laŭte, eĉ brue. Du francaj ĝendarmoj tie sidantaj leviĝis kun evidenta intenco aresti la du skandalulojn. Mi tuj intervenis : "Lasu, sinjoroj. Mi okupiĝas pri tiu afero." Mi vokis la du drinkulojn kaj severe skoldis ilin : "Ĉu vi ne hontas vi, muzulmanoj, tiel ebriiĝi? Donu al mi viajn matrikulnumerojn kaj tuj reiru al la kazerno. Estas nun la deka kaj kvin minutoj. Morgaŭ matene ĉe la gardposteno mi kontrolos la horon de via reveno. For!"

Ili malebriigitaj estis kontentaj sin eltiri je malgranda kosto, ĉar ili bone komprenis la intencon de la ĝendarmoj kaj sciis ke aresto havus pli gravajn konsekvencojn. Kun perfekta saluto ili tuj obeis.

La ĝendarmoj estis sendube spititaj, sed mia ora galono kaj mia rezoluta tono imponis al ili.

Alian fojon mi elmontris aŭtoritaton. Estis dimanĉo, aŭ eble vendredo, la islama dimanĉo. Estis mendita kuskuso por la regimento. La kruda kuskuso kuirita de la regimentaj kuiristoj kun viando kaj tre spicita saŭco, estis provizita de komercisto el Bonn. Mi estis komisiita por akcepti la liveron. La kruda kuskuso alvenis en grandaj kuvoj. Mi prenis kuleron kaj ĉerpis el ĉiu kuvo kaj gustumis. Ĝi estis fermentita, akra, malbongusta. Mi rifuzis la liveron. La komercisto malkontenta devis forpreni sian difektan varon. Probable venontan fojon li pli zorgos pri la kvalito. Mi ordonis al la kuiristoj improvizi alian menuon. Supozeble la araboj bedaŭris ne ricevi sian nacian manĝaĵon, sed, informite pri la motivoj, ili inter si laŭte laŭdis la junan leŭtenanton, kaj la oficiroj aprobis min.

Ĉiumerkrede la edzino de la kolonelo akceptis la oficirojn en sia vasta salono por kvinahora teo. Ne estis senditaj personaj invitoj, do ĉeesto ne estis deviga. Sed ĉiu sciis ke li estas invitata, kaj neniu mankis. Krom unu. Mi konscias, ke tiu konstanta sindeteno estis malĝentila, sed mi ne ricevis riproĉojn. Verŝajne mi estis rigardata kiel necivilizebla sovaĝulo, kaj traktata kun indulgo.

En somero la regimento partoprenis en grandaj manovroj sur la kampo de Bitĉo en Loreno kaj sur la belegaj montoj de Palatinato. Iun dimanĉon mia bataliono ripozis en vilaĝo kaj ricevis ordonon, ke neniu eliru el la vilaĝo. Frumatene mi saltis sur mian biciklon kaj celis al sudo, al la franca landlima urbo Visemburgo, distanca je 20 kilometroj. Vespere kiam mi revenis, la batalionestro, majoro P., diris : "Oni serĉis vin por la tagmanĝo kaj dum la tuta tago neniu vidis vin. Kie do vi estis?"

- En V., mia komandanto.

- En V. ? Vi tamen sciis, ke neniu devis eliri el tiu ĉi vilaĝo. Vi povus almenaŭ peti de mi permeson?

- Ne, mia komandanto, la ordono estis tiel nepra, ke vi ne povus doni al mi permeson : Do mi preferis ne peti ĝin.

- Do vi preferis malobei. Ĉu vi scias, ke mi devus puni vin?

- Jes, mia komandanto, "vi devas puni min."

Tia trankvila aplombo, tia kandida cinikeco malar-
mis lin. Li levis la ŝultrojn kaj parolis pri io alia.
Kial ja puni nekorekteblan sendisciplinulon?

La manovroj finiĝis per parado, en kiu ĉiu regi-
mento defilis antaŭ stabo staranta sur podio. Kapi-
tano M. diris al mi: "Mi revenos en la aŭto de la
generalo. Prenu mian ĉevalon kaj konduku la kompa-
nion." Jen do mi trankvile rajdanta. Kiam mi alvenis
antaŭ la podio mi aŭdis tondran vokon de majoro T.:
"Sinjoro! Sinjoro! Vian sabron!" Mi simple forgesis
ke mi devas defili kun la nuda sabro tenata verki-
kale laŭlonge de la dekstra brako kaj saluti per la
sabro la stabon. Mi do rapide elingigis la klingon,
tiel rapide ke la ĉevalo timigita ekbaŭmis. Mi,
ne tre lerta rajdisto, apenaŭ ne estis elseligita.
Feliĉe mi povis per kareso sur la kolo kvietigi la
bonan beston kaj la sekvo okazis glate.

Venis la tempo de la okupado etendita al la Rur-
regiono. La bataliono estis sendita al nordo apud
Krefeld por gardi fervojojn. Tie estis militista avi-
adejo, kie oni povis ricevi aerbapton. Sed necesis
permeso de la supera ĉefo. Aviado estis ankoraŭ ri-
gardata kiel danĝera sporto. Mi petis la permeson
kaj majoro P. rifuzis ĝin, sed mi tiom tedis lin, ke
fine li cedis, dirante: "Vi estas tiel obstina, ke
oni ne povas ion rifuzi al vi". Mi dum duonhora su-
perflugis la urbon en tre malpeza aeroplano de la
tempo de la milito, stirita de samaĝa leŭtenanto, kiu
desegnigis graciajn evoluojn. En tiu aparato oni vere
sin sentis fluganta en libera aero. Mi estis ravita.
Reveninte mi varme dankis la majoron. Li diris: "Vi
ĉiam estos originala strangulo." Efektive mi estis
la sola kiu petis la permeson.

Originala mi estis ankaŭ per miaj gustoj. En di-
manĉo mi trakuris kampojn kaj montojn, aŭ vizitis
muzeojn kaj monumentojn. Vespere mi ĉeestis koncert-
ojn aŭ operojn. La kolegoj preferis aliajn distraĵ-
ojn: iom drinki, fumi, babili kaj precipe fiki. Ili
diris mokete, tamen kun nuanco de admiro: "Li ne
fikas." Kaj escepte juna majoro 30-jara konkludis

kun sia kvargalona aŭtoritato: "Li estas prava: la
virinoj, pri kiuj oni sonĝas, estas pli belaj ol
tiu, kiujn oni fikas."

Mi ricevis mision konduki trajne taĉmenton da
francaj soldatoj de Dusseldorf al Witten, ĉe la eks-
trema limo de Vestfalio. Liverinte la taĉmenton al
la loka ĉefo, kapitano, mi revenis sola. Mi haltis
en Essen por viziti la metalindustrian ĉefurbon,
feŭdon de la Krup-dinastio.

La morgaŭon mi vizitis la tre moderne ekipitan
havenon de DUISBURG-RUHRORT. Kiam mi retrovis la ba-
talionon, neniu postulis klarigon pri mia iom longa
revenvojaĝo. Estis kvazaŭ silente konsentite, ke mi
ĝuas sufiĉe grandan liberecon.

Pasis vintro, venis printempo kaj la tago de mia
liberigo. Kolonelo B. mendis koktelon honore al mi
en la kazino. Ĉiuj kolegoj frate ĉirkaŭis min. La
kolonelo tostis al mia civila kariero, mi respondis
per tosto al la regimento. Agrabla etoso.

Printempo 1927. Mi resurmetis la uniformon, ĉi-
foje kun du galonoj, por trisemajna instruperiodo en
Metz.

Pluraj konsciencaj obĵetantoj kaŭris en francaj
prizonoj. Mi sendis protestan karton al la ministro
pri Nacia Defendo. Sekvis aŭtomate laŭleĝa procezo
kiel bone oleita maŝino. Loĝante en Parizo, mi es-
tis vokita al la Milita Lernejo, kie min atendis en-
keta komisiono de kolonelo profesoro kun majoro de
la Fajrobrigado Pariza kiel raportisto, kaj tri re-
zervaj kapitanoj, kiuj por la cirkonstanco surmetis
sian uniformon. Mi estis sola civile vestita. Mi
diskutis ĝentile sed firme. La komisiono retiriĝis
kiel tribunala ĵurio kaj revenis kun sia verdikto.
Per tri voĉoj kontraŭ du estis proponita eksigo el
mia oficira grado. La decido venis tre baldaŭ per
dekreto subskribita de la tiama ministro, marŝalo
Pétain. Mi bedaŭras, ke mi ne konservis tiun doku-
menton kun la aŭtografa subskribo Philippe Pétain,

kiu eble havus ian monan valoron en aŭkcio.

Mi do fariĝis simpla duagrada soldato.

(Fino de la unua parto. Sekvo en la venonta numero)

Naturamika Internacio

En nia epoko kiam ĉie aperas kaj eĉ prosperas diversspecaj naturdefendaj asocioj, fontantaj plejofte el la saturitaj urboj, oni forgesas la pionirojn, kiuj jam de longe antaŭ la 70aj jaroj de ĉi tiu jarcento instigis al amo kaj respekto al la naturo. Jam de longe esperanton uzadaŭ la Naturamika Internacio kaj do surpriziĝos neniu, ke ankaŭ en esperanto ĝi esprimas per sia **"Manifesto por nova Eŭropo"** siajn principojn kaj celaron.

La E-eldono estas mendebla ĉe : TANEF, poŝtfako 225, CH 4003 BASEL. Profitu de via mendo por, se necese, peti pliajn informojn pri la E-fako de la Naturamikoj kaj pri ties organo **"La Migranto"**.



Kvin elsendoj pri Esperanto
ĉe la franca MF-radio
"France-Culture" !

Nepre ne maltrafu ĉiumatene de 10h40 ĝis 11h, de la 13a ĝis la 17a de aprilo 1992, la


serion de elsendoj, kiun "France-Culture" dediĉos al esp-o kun jena programo :

- 13/4 : Historio de Esp-o (Pierre Janton)
- 14/4 : Neceso de lingvo internacia (Claude Piron)
- 15/4 : Esperanto en la mondo (Claude Gacond)
- 16/4 : Lingvistikaj aspektoj de E. (Michel Duc Goninaz)
- 17/4 : Esperantismo kaj esp-istoj en Francio (Henri Masson)

kaj nepre gratulu "France-Culture" pro ĝia iniciato !

Laŭte! en Pollando :

Por aboni aŭ reaboni al L! en Pollando niaj tieaj amikoj povas de nun sin turni al : Leszek DOBROWOLSKI, str. Sówia 1/10, PL-59-300 LUBIN. Abonprezo por 1992 : 15000 zlotoj. La nombro da abonoj estas limigita.



DIEST. Enirejo de beginejo

Enirejo de beginejo. La vidvinoj komencis vivi komune.

En la movado troviĝis ankaŭ multaj fraŭlinoj, el noble-laj familij, kiuj ne ricevis dotojn kaj pro tio ne povis trovi edzon, sed tamen esperis la morton de la pli feliĉa fratino, ĉar, kiam ajr, ili rajtis forlasi la komunumon. Simila movado aperis en la dektria jarcento por la viroj, sed kvar jarcentojn pli malfrue, kulpigate de herezo, ĝi malaperis pro decido de la eklezia instanco. Ankaŭ la virinaj beginejoj estis malpermesataj, krom en Flandrio, kie ili estis protektataj de la papo Johano la dudekdua. (En la komenco troviĝis beginejoj en preskaŭ la tuta Eŭropo). Tial, nur en Flandrio, ili daŭrigis sian ekziston. Du tamen troviĝas en Nederlando kaj unu en Germanujo.

En Belgio troviĝis pli-malpli 80 beginejoj; nun restas ankoraŭ 18. En 7 el ili loĝas ankoraŭ nun beginoj. La plej belaj troviĝas en BRUGGE kaj LEUVEN.

UNIKAJO :

LA FLANDRAJ BEGINEJOJ

En ĉiuj flandraj urboj troviĝas beginejoj. La beginoj estis anino de grupo de virinoj katolikaj, kiuj vivis en duone libera komunumo, ne devigataj al la severaj leĝoj de monaĥino. Ili vivis ĉastaj kaj malriĉaj, ili praktikis la publikan karitaton kaj multe preĝis kaj meditis.

En la dekdua jarcento komenciĝis la movado. Unu el la kialoj de la sukceso estis la malmulteco de viroj.

Fine de la dekdua jarcento, multaj viroj foriris al la krucmilitoj. Tio daŭris du jarcentojn. Multaj ne revenis : ili mortis pro la milito, pro diversaj malsanoj aŭ trovis ie alian virinon kaj forgesis reveni.

En beginejo, la sufiĉe riĉaj virinoj loĝas en malgranda dometo, kie ili vivas solaj kaj la malriĉaj en monaĥinejeto (10 ĝis 15 beginoj). La dometaro formas apartan kvartalon en la urbo. Tie troviĝas preĝejo. Estas du specoj de beginkvartalo : aŭ la dometoj ĉirkaŭas grandan placon (BRUGGE; AARSCHOT) aŭ ili staras en pluraj stratoj (LEUVEN; DIEST).

Dum la nokto, neniu viro rajtis eniri la beginejon, kaj tage, la vizitantoj devis esti akompanataj de begino. Kvan- kam ne tiel, kiel en vera monaĥinejo, la beginoj devis respekti kelkajn regulojn. Oni rajtis fariĝi begino nur post kiam oni estis 18-jara. Tiam oni devis fari novico- tempon ĉe pli aĝa begino. Poste, ili jure promesis resti ĉastaj kaj cbeemaj, ili ne estis vere devigataj al malriĉeco, sed ne rajtis rimarkigi sin per la vestaĵo aŭ la meblaro.

La "Ĉefa Fraŭlino" kaj kvar kortmastrinoj respektigis la regulojn. La punoj estis diversaj : preĝoj, monpunoj, eĉ korpaj punoj. Eksigo estis la plej grava puno.

En la preĝejo de la beginejo celebris pastro, kiun la beginoj elektis mem. Li ankaŭ helpis la Ĉefan Fraŭlinon estri la beginkomunumon.

Tiuj beginejoj estas grava parto de la flandra kultura heredo. Kelkaj estas nun en malbona stato. En Belgio, nepre ne malatentu tiujn vidindaĵojn, kiuj, antaŭe, estis viglaj partoj de niaj urboj.

Henri CASTIAU

ĈU ESPERANTO-DOMO EN NICO?

La Nicaj esperantistoj projektas aĉeti loĝejon en Nico por gastigi esperantistajn turistojn en komfortaj ĉambroj je kosto multe malpli alta ol en hotelo.

Por tiu celo, la tutmonda esperantistaro estas invitata aĉeti ku- ponojn po 100 FF por unu. Tiuj kuponoj estos akceptataj kiel pago de la restadkosto en Nico. Unu kupono pagos unu nokton en dulita ĉambro, kun duŝo kaj necesejo. Do 100 FF ĉiunokte por unu aŭ du personoj.

Vi nur pruntedonos monon kiel pagon de via restado ĉe la Lazura Marbordo. Petu informilon al : NICO-ESPERANTO, Les Hortensias 2, 121 bis, bd Napoléon III, F-6200 NICE. Tel.93.83.08.73.

IOM PRI

EKONOMIO

kaj LIBERECO

(daŭrigo de L. 97)

La elektomaniero estos parto de la Konstitucio, kaj ne tuŝebla. Personaj liberejoj estos skribitaj ankaŭ en la konstitucio. Iu civitano, kiu kredas sin lezita per leĝo (maljuste), povos apelacii antaŭ konstitucikonsilio. Voĉdonas civitano ekde 23-jara, civitino 18-jara. La konstitucikonsilio konsistos el 13 personoj pli ol 55-jaraj, naŭjare elektitaj po 5 far senatanoj, 5 far deputitoj, 1 far Respublik- prezidento, 2 inter kaj far jurprofesoroj. Tiel oni povas esperi, ke oni evitos subpremon de minoritato far majoritato, profesuliĝon de la deputitoj kaj insidaj agoj de "lobioj". La baza elekto de la deputitoj estas la metioj kaj profesioj, sed, ĉar ili ĉiuj ĉeestas, ili neutraligos siajn diversajn egoistajn interesojn, same la lobioj malfacile povos tie sin trudi : la rapida ŝanĝiĝo de la homoj, antaŭ ĉio malfavoros profesuliĝon kaj subagojn de la lobioj, des pli ke la deputitĉambro reprezentos la tutan variecon de la profesioj.

5) SOCIAJ ORGANISMOJ

5.1 Juĝa administracio

Ĝi devus esti organizita en Korporacio sendependa de la registaro : hodiaŭ la supera konsilio konsistas el 12 membroj elektitaj far la Respublika Prezidento, do far la politika potenco (9 el triobla prezentlisto, kaj 3 elekstere).

La supera konsilio devus konsisti el magistratoj po unu elektitaj far siaj kolegoj el ĉiu ŝtupo kaj speco civitana, krima, administracia, socia, al kiuj oni eble aldonus la Komercan specon. Ĉiu voĉdonus laŭ sia ŝtupo, kaj al tio oni aldonus 4 jurprofesorojn far siaj kolegoj elektitajn. Tiuj, aĝantaj pli ol 55 jarojn, estos elektitaj por 10 jaroj ; la pli junaj por 3 jaroj. Kontrolos ilin la konstitucia konsilio.

La juĝistoj estos ĉiujare alterne prokuroroj kaj juĝistoj. Tribunalato povos ĉiam alvoki juĝotan aferon eĉ sen interveno de prokuroro.

Policianoj havas rajton paŝi post minacaverto, ekzemple se suspektato volas fuĝi. La supera konsilio kontrolos la laŭlegajn faktojn se estos homa morto. La policianoj ne rajtos fari pridemandadon sen ĉeesto de advokato.

La supera konsilio kontrolos, ke suspektato ne estos enkarcerigita sen grava kaŭzo (dangera homo, internacia bandito, kiu riskas malaperi, ktp.)

5.2 Instruado

Necesas, ke oni serioze pripensu pri radikala reformado de la instrumanso : ĝi tute fiaskis por la adaptado de la instruado al la bezonoj de la entreprenoj, kaj tial fabrikas nur senlaborulojn. La instrumentisterio estas tute konstruita por formi profesorojn kaj tute ne por metioj kaj industriigo ; tial mi pensas ke la afero pliboniĝos nur kiam oni distranĉos la teknikajn branĉojn for de la instrumentisterio por ilin doni al la ministerio pri industrio kaj komerco, tutsame kiel la agrokultura instruado dependas nur de la agroministerio. Tiel la ligoj de la instruejoj kaj la industrio kaj komerco estiĝos tute nature. Tiel, espereble, ĝi eskapos al la korporaciismo de la instrumentisterio, kiu ĉetero tiom grandigis (1 200 000 instruistoj kaj administrantoj), ke ĝi fariĝis vera teratosuro ne plu regebla.

Por la elementaj lernejoj oni ne trudos metodojn, sed postulos nur rezultatojn : je 9 jaroj la infanoj devos scii legi kaj kompreni kion ili legas ; je 11-12 jaroj ili devos scii uzi la kvar aritmetikajn operaciojn. Por tio estos naciaj ekzamenoj. Psikologoj ekzamenos tiujn, kiuj ne sukcesos, por kontroli ĉu ili restos ankoraŭ unu jaron en alia elementa lernejo, aŭ ĉu oni devos ilin sendi al specialaj porhandikapulaj lernejoj.

Krom tio, la instruejoj devos esti sendependaj por siaj programoj kaj funkciado ekde mezgrada lernado, tiel ke la junuloj kaj gepatroj havu la plej grandan elekto- econ, kaj ke okazu konkurenco inter la diversaj lernejoj : sola postulo estas "sukceso".

Kiel en Nederlando, la familioj ricevu lern-
ĉekojn, kiujn ili donu al la elektitaj lern-
ejoj.

En la vivo, ĉiam selekto okazas. En la
lernejo oni ankaŭ selektos per enirekzame-
no (krom en la elementaj lernejoj), por
eviti ke la nekapabluloj perdu sian tempon
kaj superplenigu la lernejojn. Kompense,
oni povos je ĉiu aĝo postuli trapasi enir-
ekzamenon, ĉar la komprenkapablo disvolv-
iĝas foje malfrue.

Metilernado estos disvastigita kaj tre
kontrolata (kio nun ne okazas), aŭ efektivi-
ĝos en metilernejoj kontrolataj far indus-
tri- kaj komerc-ĉambroj. Tiuj lernejoj po-
vos esti privataj aŭ kooperative regataj far
la industri- kaj komerc-ĉambroj.*

5.3 Radio- kaj Televid-dissendado

Restos nur unu ŝtata televidsendilo, sen-
reklamaj kaj nur kultura. Ne plu estos in-
formofico, kaj "oficiala" vero. Estos dis-
sendataj nur la deklaraĵoj de la ministroj
kaj de la Prezidento. Tiu ŝtata organizo
devos ĉiujare dissendi almenaŭ 24 teatrajn
klasikaĵojn kaj 36 klasikaĵajn filmojn, plus
52 elsendojn pri libroj, klasikaĵ aŭ ne. Dev-
iĝe, pri ĉi tiu temo estu organizataj dueloj
sen ekskluzivo inter du kontraŭuloj.

La ŝtata televidsendilo funkcios merkre-
de, sabate kaj dimanĉe de la 9a matene
ĝis la 22a vespere. La aliajn tagojn, ĝi
funkcios de la 17a ĝis la 22a. Merkrede,
sabate kaj dimanĉe oni organizos klerigajn
dissendaĵojn por la infanoj je konvenaj ho-
roj. Klerigajn dissendaĵojn oni kompreneble
organizos ankaŭ por la plenkreskuloj.

La privataj elsendiloj (radiaj aŭ televi-
daj) povos esti naciaj aŭ urbaj. Ili vivos
per reklamoj. Estos ordeno de la informis-
toj: ĉiu, kiu scie mensogis eĉ se nur unu-
foje, estos forigita de la informofico; se
nescie, post trifoja malvera informo, li es-
tas ankaŭ forigita. En la unua kazo li es-
tas mensogulo; en la dua, li estas tro na-
iva por fari tiun metion. Kompreneble, li
povos esti dungita por alia ofico (veter-
prognozo, literaturo, ktp). Estas skandalo,
ke homoj kiel Jean DANIEL, kiu kontraŭ-
diris SOLJENICIN, kiu venis el 10 jaroj da
bagnio (punlaborejo), kaj neis lian eksperi-
menton, ke Jean LACOUTURE mutis men-
sogis pri la krimoj de POL POT dum li es-
tis en Kampuceo, povas ankoraŭ partopre-
ni politikajn diskutojn. Same, en gazetaraj
revuadoj, iuj gazetoj estas ĉiam citataj
dum aliaj, same gravaj, heniām. Ekestos
rebataĵoj kiel kontraŭ la gazetaro.

5.4 Asocioj

Ĝia leĝo datumas de la 1-a de julio
1901a sub kontraŭklerikala ĉefministro
WALDECK-ROUSSEAU. En tiu epoko,
oni identigis la ekleziularon al rojalistoj
kaj kontraŭrespublikanoj. Pro tio la reg-
istaroj persekutis la kongregaciojn, kaj
komencis agi kontraŭ la religiajn instru-
istojn kaj ties lernejojn, kiujn poste ferm-
igis Emile COMBES. La leĝo de 1901a
spegulas la tiaman politikan etoson kaj
montras grandan malfidon al influo de
la eklezio. Pro tio, ĝi "butonumis tre
malvaste" la senproficelajn asociojn, ke
ili estu strikte kontrolataj de la ŝtato.
Tiel ili ĝenerale ne rajtas ricevi donac-
ojn de privatuloj, sed nur stipendiojn de
registaraj instancoj (urbestraro, departe-
mento, ministerioj...) kaj per la mono oni
tenas ilin en la mano de la registaro.
Tio estas grava atenco kontraŭ libereco,
kio ne ekzistas alilande, nek en Britlan-
do, nek en Usono, nek en Germanlando,
nek... en departementoj MOSELLE, HAUT-
RHIN kaj BAS RHIN, kiuj konservis
post reveno al Franclando la germanan
leĝon de 1903a, laŭ kiu la asocioj
povas ricevi donacojn de privatuloj, kaj
estas registritaj ne en Prefektejo (rekta
okulo de la registaro), sed en tribunalo
sendependa (almenaŭ teorie), kaj kiu po-
vas juĝi ĉu la asocicelo ne estas malmo-
rala. En Franclando nur la Asocioj
"agnoskitaj pri publika utileco" far nur
la registaro, sen tribunala kontrolo, kio
estas politika diskriminacio inter la aso-
cioj, kaj klarigas kial la Esperanto-aso-
cioj ne sukcesis ricevi tiun agnoskon.

Mi pensas, ke oni plivastigu al tuta
Franclando la leĝon, kiu validas en Alza-
co-Loreno. La leĝoj pri moderigo de la
enspezimpostoj pro helpo al asocioj kaj
diskriminacio pro "agnosko aŭ ne" forfa-
los post forigo de la enspezimpostoj kaj
estabo de Kapitalimpostoj.

* Oni penas plivalorigi la manlaboron.
Simpla paper-ŝmirado ne devas, kiel ho-
diaŭ, esti pagata pli ol metia manlaboro.
Oni ne forgesu, ke ankaŭ kirurgiistoj es-
tas manlaboristoj speciale lertaj: man-
lerteco estas valoro...

6. KONKLUDOJ

Necesas aldoni, ke moraligado de la
grandaj industri-trustoj estas unua devo
de registaro. Oni devus konstituciigi la
borsan kontrolkomisionon, kaj doni al ĝi
povojn de esploro kaj juĝo almenaŭ simi-
lajn al tiuj starigitaj en Usono.

Fine, oni devas konstati, ke sen indivi-
dua respondeco ne povas ekzisti vera li-
bereco, kaj ne povas esti "homaj rajtoj"
estas nur ĥimeroj, kiuj kaŝe intencas nei
homan respondecon. Kion do signifas
"infan-rajtoj"? La infanoj ne naskiĝas li-
beraj kaj egalaj inter si: la bebo ne ka-
pablas marŝi nek sin mem nutri. Ĝi havas
rajtojn nur en la sino de RESPONDECA
familio. Same, la laborrajto komprene-
ble kiel salajrrajto, ne ekzistas: estas nur
labordevo kaj laborebleco, kiuj ekzistas
nur se sufiĉe da entreprenoj povos naski
salajrapropozojn kaj dungeblecon. Entre-
preni estas la vera rajto, ĉar entrepreni
estas ago plenrespondeca. En sana ekono-
mio, oni ne povas postuli ke entrepreno
kaj entreprenisto perdu monon nur por
doni salajrojn: la ŝtataj entreprenoj nur
kaŝis tiun feran leĝon: kion oni donas
malprofite al iu, oni forprenas de
alia...

Finfine, malpli da orgojlaj egalecaj de-
vizoj, sed pli da konkreta libereco kom-
forto!

Fine, mi devas peti pardonon, ke mi ti-
om ŝmiris paperon, kio unue tute ne es-
tis mia intenco: mi celis nur diskuti la
MARKS'an teorion kaj la ŝtatekonomion,
sed mi konstatis, ke oni devas ion propo-
ni pri ekonomika solvo, kaj mi alvenis al
la proponoj de Mauriĉe ALLAIS, kiuj al
mi ŝajnas saĝaj por ekonomia bonfarto.
(En 1935a jam belga ekonomikisto
Jules ROMAN perceptis la neceson ligi

ESPERANTO, VIA ĜOJ'

Vi pri la vivo ĉiam plendas
Kaj iun ŝanĝon nun atendas.
Do, ni instigon por vi sendas:
Tuj Esperanton lernu vi!

Refreno: Esperanto (2) savos vin,
Jen fenestro al la mond'
aŭskultu nin!
Esperanto (2) via ĝoj!
Dò al lingvo Esperanto estu voj'!

Malgaja viv' de pensiulo
ĉar ofte estas jam kriplulo,
Naturamanto kaj "verdulo"
Li hejme devas sidi nur.

(Refreno)

Kiam la sorto multe ĝenas
Se via paŝo jam malplena
Kaj vi delonge vane penas
Vagadi tra la tuta mond'!

(Refreno)

Se ŝatas belajn aventurojn
Se volas koni la fremdulojn
Vi junulino kaj junulo
Se volas migri tra la mond'!

vortoj: T. Jankowska

vortoj: Teresa Jankowska
muziko: Henryk Ozarek

vi pri la vi-vo ĉi-am plen-das kaj i-un ŝan-ĝon nur a-

-ten-das Do, ni in-sti-gon por vi sen-das tuj E-spe-

-ran-ton ter-nu vi E-spe-ran-to, E-spe-ran-to sa-voŝ vin,

jen fe-ne-stro al la mond' aŭ sku-ltu nin! E-spe-ran-to, E-spe-ran-to vi-a ĝoj' do, al

lin-gvo E-spe-ran-to e-stu voj' Do, al es-tu voj'!

AMERIKO KAJ ĜIA MALKOVRO

Ĉi-jare en la tuta Ameriko kaj la Ibera Duoninsulo oni festas la malkovrojn de Kolumbo. Ĉu vere estas okazaĵo por festi? Unu el la plej grandaj genocidoj plenumitaj de la homaro! Milionoj da indianoj estis mortigitaj en la nomo de Kristo, aliaj pro siaj posedaĵoj kaj la plimulto laboris kiel sklavoj por la konkerantoj. Kiam la konkerantoj aperis, se ni sumigas Aztekojn, Inkaojn kaj Moĵaojn, ekzistis inter 70 kaj 90 milionoj da indianoj. 150 jarojn poste, restis 3 milionoj kaj duono. En Potosí, Bolivio, en minejo de arĝento, mortis en 3 jarcentoj 8 milionoj da indianoj, ktp, ktp. (°)

Ĉu intertempe ni ŝanĝis niajn vidpunktojn? Tute ne. En 1957 (°) la Supera Kortumo de Paragvajo sendis cirkuleron al ĉiuj juĝistoj de la lando, dirantan ke la indianoj estu rigardataj kiel homaj estaĵoj same kiel la aliaj loĝantoj de la lando. Kaj tuj poste enketo farita en tiu lando donis kiel rezulton, ke 80% de la loĝantoj, kvankam preskaŭ ĉiuj havas indianan sangon, asertas, ke la indianoj estas kiel bestoj (°).

Rigardate el astronoma perspektivo, la tero estas tiom malgranda, tiom sensignifa, ke jam de relative mallonga distanco ĝi estas nevidebla. Kial ĝin dividi, kial starigi limojn? Oni sendiskute akceptas de la tradicio la faktojn okazintajn. Kelkiuj loĝas je unu flanko de iu landlimo kaj diras, ke la homoj je la alia flanko estas stultaj, mensogemaj, malpuraj. Iu milito ŝanĝas la limon, kaj tuj la homoj, kiuj nun apartenas al la alia flanko, ŝanĝas siajn vidpunktojn. La antaŭaj amikoj nun fariĝas eksterlandanoj. Ĉu ni vere estas nenio pli ol infanoj sen-pense akceptantaj ĉion, kion oni diras al ni? Akceptantaj arbitrajn landlimojn kiel sanktigatajn murojn?

Post la lasta milito, kiam la internacia turismo komenciĝis, oni estis instigita pensi, ke nun multaj ekonos homojn de aliaj partoj de la tero kaj vidos tie, ke la diverseco, la manĝ- kaj agkutimoj estas nur trudo de la klimato, de la vivomedio, ke tiaj diversaj estas nur bagateloj. Sed anstataŭ tio, la turistoj kunportas siajn landlimojn kun si, konvinkite ke ili estas la plej bonaj,

puraj, sinceraj, kaj malestimas la "indiĝenojn". La enloĝantoj reagis konforme al tio kaj la bataloj plu daŭras.


Kiu povas festi la okazintaĵojn en Ameriko sen kaŝi sian vizaĝon pro honto? Kiu pensas pri la indianoj? Ĉu ili emos festi? Ili, kiuj nun estas la plej malriĉaj sur la tero forprenita de ili? Kiom da tempo devas ankoraŭ pasi ĝis ni lernos konduki kiel plenkreskuloj, sentemaj, komprenemaj? Kaj ne pensu nur pri la rilatoj inter eŭropanoj kaj amerikanoj, pensu pri la rilatoj inter tiuj tiom malgrandaj eŭropaj landoj, aŭ nur inter la provincoj de kelkaj landoj. Kial ni kredas, ke niaj propraj kutimoj estas pli bonaj ol la de aliaj? Finfine, kiel dirite, temas nur pri kutimoj senpense akceptitaj de niaj antaŭuloj. Ni lernu pensi.

Delia PICK

(*) Eduardo Galeano, *Las venas abiertas de America Latina*, germana versio, Hammer Verlag 1973, Paĝ. 50-54.

E-STAGO en AGDE (Hérault, F) * 27/31. Majo 1992

okazos en "Centre de Vacances BATIPAUME", situanta kamparimeze, sur la vojo al Rochelongue je 2 km de AGDE kaj de la maro. Ĉirkaŭata de granda parko kun arboj (8 ha), la bieno estas agrabla ripozloko. Prezo: 160 FF tage, do 640 FF por la restado (840 FF por individuo ĉambro). Kunporti tualettukojn. Ebleco ludi luttukojn surloke (25 FF). Kotizo: 100 FF ĝis 30/04. Poste tiu dato: 180 FF. Ĉiujn korespondaĵojn al: C.B.E. 9 rue Georges Picot F-34500 BEZIERS. Tel: 67 31 13 18 aŭ 67 31 13 46 aŭ 67 38 03 52.



ĉies voĉo

Respondo al la ciumada VALO (L. 97 p.16s.)

VALON, kies «vortojn» mi cetere ege ŝatas, mi devas tamen tiufoje atentigi pri konsekvencoj, kiujn preteratentas ne nur li, sed multaj kamaradoj, precipe el francaj SAT-rondoj, uzante *ci*, kiel ili diras *tu* aŭ *toi* en ilia franca lingvo.

1. Kompreneble, la franca lingvo faras tiun diferencigon inter intima kaj aliflanke respekta, ĝentila, oficiala aŭ distanciga alparolo. Tion ne faras E-o. Kvankam en la Fundamenta Vortaro (FV) «*ci*» estas menciita por signi tian *tu*, *toi*, por kiu la angla lingvo havas sian *thou*, la FV mencias «*vi*» por signi *vous*, *toi*, *tu* (france) kaj *you* (angle), *Ihr*, *du*, *Sie* (germane) ktp. Kaj, pli grave, en la Fundamenta Gramatiko (FG) la tiurilata pronomo estas «*vi*», kaj nur «*vi*» - estas eĉ ne aludo pri *ci*. Do, en nia lingvo «*vi*» kovras ambaŭ nuancojn: la intimeco de la rilato kaj ties oficialeco devas esprimiĝi alie ol per la persona pronomo. Do, dirante «*vi*» al amat(in)o, tiu «*vi*» tute ne havas la signifon de la franca *vous*, sed ĝuste tiun de la franca *tu*, *toi*. Kaj la preteratento kaj certe ankaŭ ioma facilanimeco de la ciumantoj konsistas en tio, ke dirante *ci*, ili ne nur diferencigas la alparoladon, kiel ili pretendas, sed samage ŝanĝas la signifon de la «*unuca*» E-a «*vi*». Mian teneran «*vi*» al amatino, ili sufiĉe ridinde mistradukus per la franca *vous*, se ili estas konsekvencaj.

Do: la franca *tu* NE signifas *ci*, sed «*vi*»; kaj la E-a «*vi*» NE signifas la fandan *vous*, sed ambaŭ: *tu* kaj *vous*, laŭ la okazo. Tiom pri la Fundamenteco.

2. VALO diras: «Antaŭ pluraj generacioj franca infano diris "vi" al sia patro, "vi" al sia patrino». Certe, se ili parolus E-on. Sed kion volis diri VALO, estas ke ili diris *vous* anstataŭ *tu*, kaj tio estas tute alia afero, - en E-o ne facile redonebla (ili do diris «*vi*»

anstataŭ «vi»). Tio estis sisteme pli socia distingilo ol signo de intimeco aŭ ties malo, ktp. Se ne nur VALO, sed eĉ «samklasaj» Franĉoj hodiaŭ miras pri tiu pronomo, tio montras nur, ke tiu franca *vous* havis tiutempe alian rilatan signifon ol hodiaŭ: ĝi havis preskaŭ precize la valoron de la hodiaŭa *tu*. Se oni modernigus tiajn tekstojn, do: traduko de eksaktuala franca lingvo al aktuala franca, oni devus traduki tiun *vous* per *tu*. Do, franĉaj – kiel aliaj – tekstoj perdas parton de sia komprenebleco; tio ne estas malfacilaĵo nur de Esperantigo de tiaj tekstoj, kaj eĉ diferencigo per Esperantaj *ci* kaj «vi» tute ne solvus tiun problemon.

3. *Ci* ĉe tradukoj el nacilingvaj tekstoj, kie tiu pronomo ludas gravan stilan rolon, estas ja ebla, sed tiam *ci* rolas ne nur kiel signo de intimeco, sed kovras pli vastan skalon, de senĝeneco ĝis malsato (superulo al senrangulo). Ne tre oftaj estas tiaj tradukendaj tekstoj, kaj en nia E-a vivo ni prefere evitu tiun kroman kaŭzon de embarasoj.

4. VALO citas junulojn, kiuj hodiaŭ senĝene, eĉ ne konante unu la alian, tuj interparolas per «*ci*», kiel li diras – sed pli ĝuste per *toi, tu*, anstataŭ *vous*. Tio estas socia fenomeno sufiĉe interesa. Uzo de tiu signo povas ja esti deklaro de intimeco aŭ signo de senĝeneco. Sed de la momento, en kiu ili diras ĝenerale *tu, toi* al ĉiu ajn, tiu distingilo ne plu funkcias – post iom da kutimo estas kvazaŭ ili dirus sendistinge *vous*. Simila afero estas, se temas pri organizaĵoj kiaj laborulaj partioj (komunismaj, socialismaj, ĝenerale maldekstraj), sindikatoj ktp., kiel ekzemple pri SAT. Tiaj organizanoj emas sin distingi same per tiu nacilingva distingilo, kaj oni tie diras *tu, toi* al ĉiu samideano sendistinge, eĉ alparolante homon, kiun oni suspektas iom fia. Sed la membreco sufiĉas por doni ian «intimecon» al ĉiu, kiu per tio distingas sin disde la cetera mondo. Kun partiano k.s. oni esprimas pli da intimeco, da senĝeneco, ol kun aliaj homoj. Por mi mem mi trovas tiun

distingilon maltaŭga per miaj ideoj de principa frateco kun ĉiu homo: mi preferas la sendistingan «*vi*». Kaj por esprimi veran intimecon, ni disponas espereble pri aliaj rimedoj ol pri la persona pronomo.

5. Sed krome, tiu «organiza» *tu, toi* kaj ankaŭ tiu ĉe parto de la junularo havas ankoraŭ alian aspekton, tiufoje tre praktikan. Sekve de la sperto, ke oni unue diras *vous* kaj post iom da pli bona interkonatiĝo *tu, toi* oni, dekomence dirante *tu*, evitas la embarason, kiu ofte aperas pri la taŭga momento por ŝanĝi la alparolformon (ofte ĉe glaso da alkoholaĵo). Kaj kiu konas multajn homojn, eble ne ĉiam fidele memoras pri ĉiu persono, ĉu la rilato estas per *tu* aŭ per *vous*. Ankaŭ tiun embarason oni evitas, kaj VALO trovas tion racia – sed bedaŭrinde interpretas ĝin per *ci* anstataŭ «*vi*». Do, tiusence ne temas pri diferencigo, sed pri paŝoj al unuformigo, do oni traduku tion per nia jam dekomence unuforma alparolilo: «*vi*».

6. Aprobo de Lanti diras nenion. Li mem ja helpis enkonduki tiun lingvan mispaŝon, kiel cetere aliajn, en (la precipe francan) parton de la SAT-medio, el kiu ni hodiaŭ kun peno provas ilin eligi, kiel ekzemple *alies* (kio ja estas nur kunskribita «al ies, sed kun erara signifo) anstataŭ «*aliies*» aŭ «*aliula*».

7. Cetere, eĉ se oni emus akcepti tiun distingilon, kiu ja ne nur estas senutila, sed laŭ la Fundamento ankaŭ fuŝa (ĉar ĝi per sia nura uzado ŝanĝas la alian radikon: *vi*), oni estus tiam devigata eligi tiun akran sibladon («*ci*») en momento de intimeco, al iu, kiun oni preferus karesi per molaj silaboj, ekzemple per «*vi*». Male, tiun aĉe siblantano «*ci*» prefere diru al hundo, kiun vi volas forpeli. Sed ankaŭ tion oni faru nur en eksterordinaraj kazoj, ĉar eĉ hundo rajtas la bonan kaj belan E-an «*vi*».

Neniam alparolu min per «*ci*»! Mi sentus min pelata hundaĉo – kaj tio malutilus mian sanon.

VIRINO KONTRAŬATAKAS...

Mirigis min, ke la artikolo de Lopez Luna (L! n-ro 96) ne naskis ondon de reagoj el la Laŭtulinoj! Ĉu vere ili konsentas pri la opinio de nia amiko el Buenos Aires? Tio ne eblas!!!

Jen mia respondo al tiaj viraĉaj atakoj kontraŭ la virinaro.

La artikolo de Lopez Luna evidente karakterizigas per supraĵa simpla pensmaniero. La verkisto ne taksis necese pravigi sin per faktoj, nek kompari siajn asertojn kun la realeco.

Kaj li eltiras el sia poŝo tian malnovan kokerikon: "Dum jarcentoj, la virinoj estis ĉiam submetitaj al la viroj". Ĉu? Eble kelkaj historiaj faktoj reaperigos la verecon.

La franca popola geedziĝo (1750-1850) fakte baziĝis sur komerca distribuado de la taskoj. La taskoj estis strikte apartigitaj kaj tute egalvalore konsiderataj. La edzino respondecis pri la laktaĵoj kaj la kortobirdaro. Ambaŭ ĝuis financan sendependecon. Ofte, nur la edzino posedis la ŝlosilon de la tritikejo. (Tritiko estis tiam la precipa pagrimedo) (1)

Samepoke, la vaska virino povis esti laŭleĝa heredantino kaj ŝiaj decidoj nepre respektataj. Dum la mezepoko, la viroj, okaze de edziĝo, prenis la nomon de sia edzino. (2)

Lopez Luna konsideras nur la dudekjarcentan civilizacion, kies progreson Marie-Curie, Cori Tereza, Rosalin Yalow, Barbara Mac Clintock, Florence Nightingale, Indira Gandhi, Margaret Thatcher, Golda Meir kaj aliaj, tamen markis per siaj spuroj. (3)

La artikolverkinto, sen ia ajn pruvo, asertas, ke la virinoj ne posedas la samajn kapablojn kiel la viroj, kaj tute ne kalkulas pri la socia premo ĉirkaŭ la virino. Tia premo ankoraŭ nun komprenigas al la virinoj, ke ilia patrineco estu ilia nura vivopleniga tasko.

Tia ĉirkaŭaĵo, kies ekzempla subtenanto certe estas Lopez Luna, estas la plej granda malhelpo por la egaleco de la virinoj.

Julia Maes (Castiau)

(1) SHORTER : La estonto de la familio.

(2) Encyclopedia Brittanica

(3) Lexikon der Frau

LETERO EL FILIPINIO

"...Jam mi alvenis en Filipino antaŭ 1 semajno, kaj mi ĝuas la somerajn temperaturojn ĉi tie, forlasinte frostan, malvarman Germanion. Mi vivas ĉi tie en la domo de miaj bogepatroj... Nun mi sidas en la mallarĝa korto antaŭ la domo, en ombro de alta kokospalmo kaj de du grandaj, densaj jukalpalmoj. Iom freŝa vento mildigas la tropikan varmon. Mi konstatas, ke de post mia lasta vizito ĉi tie la prezoj por multaj necesajoj de la ĉiutaga vivo duobligis, kelkaj eĉ triobligis. Ne por ni Eŭropanoj, ĉar la monŝanĝo kurzo adaptiĝis al tio. Sed por la indiĝenoj la salajroj nur tre modeste kreskis, ege pli forrapidis la prezoj. Jen konfirmo de la tezo plurfoje prezentita en diskutkontribuoj en *Laŭte*, ke la ekspluatado de la t.n. evolulandoj (terura esprimo!) fare de la pli riĉaj landoj pli kaj pli akriĝas. Oni ja povas aĉeti ĉion en magazenoj ĉi tie - sed la ordinara popolo ne havas la monon. Je mia demando, kiel ili povas sin vivteni, per tiuj malaltaj salajroj, (apenaŭ 15-ono de kompareblaj okcident-kaj mez-eŭropaj salajroj), oni respondis ke oni tutsimple faras ŝuldojn, tiel la vivo funkcias plu. Sed ĉu oni povas amasigi ŝuldojn dum jaroj? Certe la bankoj iam ĉesas prunti. Tiam domo kaj grundo estos jam for. Kaj kion faras tiuj, kiuj jam ne posedas domon?

Filipinio estas lando riĉe dotita de la naturo. Oni rikoltas dufoje ĉiujare, kaj la homoj estas labor-emaj. Tamen plimulto vegetas en mizero. Evidente io estas ne en ordo en la distribuado de la perlaboradoj en la mondo. Riĉuloj iĝas pli riĉaj, malriĉuloj pli malriĉaj, jen kion oni nomas justo en la mondo. Ne miru, ke homoj en malriĉaj landoj, kiel Filipino, kredas, ke ĉiu blankhaŭtulo estas milionulo. Ili ja vidas nur ke usonaj kaj eŭropaj komercistoj kaj tur-

istoj povas pagi por unu nura tranokto en luksa hotelo, sen la manĝoj, jam egalvaloron de salajro por indiĝena laboristo por 1-2 monatoj! Ankaŭ mi ofte estas demandata, kial mi dormas sur la planko, sur mato plektita el bananfolioj, samkiel la indiĝenoj, kial mi ne loĝas en hotelo, kiel "decas por riĉuloj el Eŭropo". Mian respondon, ke mi ne estas fabrik-direktoro aŭ bankisto, ke mi do ne povas permesi al mi tian lukson, evidente oni ne ĝuste komprenas kaj apenaŭ emas kredi. Oni miras ankaŭ, ke ni aĉetas ĉi tie la somervestojn "Made in Filipino". Laŭ opinio de la indiĝenoj ili estas malbonkvalitaj kaj taŭgaj nur por vere malriĉaj indiĝenoj. Fakte ili estas ofte pli bonkvalitaj ol tio, kion oni ofertas en eŭropaj magazenoj - je prezoj multe pli altaj. Ŝajnas, ke usonaj kaj eŭropaj komercistoj intence kredigas al la indiĝenoj, ke iliaj produktoj estas malbonkvalitaj, por marĉandi por si mem favorajn prezojn.

En la kvartalo, kie mi vivas nun, necesas ellitiĝi matene antaŭ la 5a, se oni volas dece lavi sin. Poste la akvo venas nur pogute eĉ el la krano en la korto. Ekde ĉirkaŭ la 7a eĉ tiu lasta fonto restas seka ĝis la malfrua vespero. Do, oni devas provizi sin dumnokte per la akvo por la tago. Oni klarigis al mi, ke la loĝantaro en tiu kvartalo tro rapide kreskis, kaj la urbo ne havas sufiĉe da mono por adapti la akvotubojn al la kreskanta bezono.

Post kelkaj tagoj mi ekvojaĝos por viziti diversajn parencojn en diversaj partoj de la lando. Mi esperas, ke poste mi povos raporti iom pli...."

Manfred Fuehrer

Kuracistino el Pollando invitas Esperantistojn al sia kampara, ligna domo, kiu nomiĝas "Esperanta Domo por Ĉiuj. La posedantino povas instrui Esperanton. Restado preskaŭ senpaga. Freŝa aero, verda herbo. En centra Pollando (140 km. de Varsovio).

Teresa JANKOWSKA, ul. Twicka 40 m 18, PL-00-735 WARSZAWA. Polska

LA PLEJ RIĈA LINGVO : LA ANGLA...

Bonvole pardonu la malfruecon de tiu ĉi respondo al komento, kiu aperis en L! antaŭ sufiĉe longa tempo. Sed la komento estis tiom kontraŭfakta, ke ĝi vere postulas respondon. La komento estis (proksimume) : "La angla estas la plej riĉa lingvo, ĉar plej disvastiĝinta".

UNUE : Oni ne povas mezuri la riĉecon de lingvo per simpla statistiko. La nombro de vortoj en granda vortaro de la lingvo montras eble la evolustaton de leksikologio en tiu kulturo, sed ĝi nenion diras pri la riĉeco de la fakta ekzistanta kaj uzata lingvaĵo.

Iam mi legis, ke kelkaj needukitaj Angloj loĝantaj en izolaj vilaĝoj scias nur ĉirkaŭ 1000 vortojn! Eble troigita statistikaĵo, kaj kompreneble oni ne povas mezuri eĉ la riĉecon de la lingvoscio de unu individuo per nombro de vortoj sciataj, sed ĝi montras, ke ja la individua lingvoscio gravas, ne la enhavo de vortaroj, kiujn la plej multaj homoj neniam konsultas. Certe mia individua scio de Esperanto estas pli "riĉa" ol la individua scio de multaj Angloj pri sia gepatra lingvo, ĉar la sorto min favoris per bonega edukado kaj tempo por legado. Eble mia individua scio de Esperanto ankoraŭ ne transpasis mian scion de mia gepatra lingvo, sed ĝi proksimiĝas rapide.

DUE : Se oni volas mezuri la riĉecon de tuta lingvo (tio estas : la lingvaĵo de tuta lingvo-komunumo), oni devas kalkuli, kio estas vere komuna al ĉiuj anoj de la komunumo. Uzate kiel internacia lingvo, la angla estas tre malriĉa. Ekzemple, ĝi eĉ ne havas vorton por "lernejestro".

Ĉu kredeble? Sed mi renkontis tiun problemon en la internacia komputila reto. Iu estis tradukinta liston de Esperantaj vortoj en la anglan por dissendi kiel ekzemplojn de vortfarado en nia lingvo. Oni sendis malneton al mi por korektado, ĉar la angla estas mia gepatra lingvo. Mi trovis la tradukon "lernejestro" : "principal" kaj komentis : "Ne! La ĝusta traduko devas esti **head-master**." Poste iu Usona Esperantisto diris : "Ne ne! Neniu Usonano komprenus la vorton **head-master** ; ĉe ni oni diras **principal**." Mi devis respondi : "Neniu Brito komprenus la vorton **principal**. Bone estas, ke ni povas senĝene komuniki en Esperanto!"

Mi ne volas kritikaĉi la anglan lingvon ; la lingvo de Ŝekspiro estas belega kaj esprimoforta. Sed kiom da angla-lingvanoj kapabias ĝui Ŝekspiron? Kiom da alilingvanoj, kiuj "lernis" la anglan lingvon? Kiel "internacia lingvo" la angla lingvo estas ofte malpli riĉa ol la Esperanto de 1887, kaj Esperanto multege progresis de tiu tempo.

La citita frazo supre de mia artikolo devas esti korektata al : "Ju pli la angla disvastiĝas, des malpli ĝi riĉas." Kaj tio estas unu el la motivoj, pro kiuj kelkaj Angloj pasie subtenas Esperanton : Ili amas sian gepatran lingvon kaj ne volas, ke la internacia uzado ĝin piĝinigu.

Edmund GRIMLEY EVANS (1992-03-14)

Retadreso: dfkihueg@rz.uni-sb.de

DENOVE : VIDPUNKTOJ

En L:97, R. Margalef riproĉas al mi ne esti konvinkinta lin en mia artikolo : "Frenezula afero : etnaciismo" (L:96). Neniām estis mia ideo konvinki iun ajn al miaj opinioj. Mi simple provis montri la valoron de Sennaciismo, laŭ miaj spertoj, kaj iom pli nune ol kiam Lanti esprimis tiun ideon. Mi mem, kiam mi aniĝis al SAT en 1940, trovis tiun ideon iom stranga. Mi tute ne estis naciisto kompreneble, sed internaciisto, kaj mi opiniis, ke tio sufiĉas. La ideo pri la horzona divido de la mondo ŝajnas al mi tute fantazia, ĉar en la sama horzono vi havas homojn, kiuj vivas en tre malsimilaj kondiĉoj. Sed iom post iom miaj spertoj en diversaj partoj de la mondo, ĉefe en la Tria Mondo, konvinkis min, ke naciismo estas tute falsa ideo. Mi spertis, ke la homoj fundamente estas ĉie la samaj, konsekvence mi konsciis, ke sennaciismo transcendas internaciismon. La tuta homaro estas ununura zoologia speco. La nacioj, la rasoj, la religioj, la lingvoj, estas artefaritaĵoj. Tia estas mia opinio, sed mi ne malhelpas naciistojn opinii la malon.

Margalef estas falsa naciisto, la veraj naciistoj (Skinheads, novnazioj, ktp...) ne fariĝas esperantistoj. Male ili sendis nian k-don Petro Mayer kaj liajn aŭstriajn kamaradojn en ekstermejon Maŭthausen en 1943, ĉar ili praktikis tiun lingvaĉon de Judo. Ili sendis nian k-don Eto (Klein),

ĉar li propagandis pacismon en 1943, en ekstermejon ankaŭ. Kaj kiom da kamaradoj, de mi nekonataj, kiuj havis saman sorton! Ili ne sendis min en ekstermejon, nur pro tio ke ili sciis pri miaj ideoj kaj rilatoj kun germanaj SATanoj tro malfrue. Mi ne scias kiom da kamaradoj ili mortigis pro samaj aŭ similaj opinioj. Ili batalis kontraŭ bolŝevistoj kaj Judoj, sed bolŝevistoj estis ĉiuj progresemuloj.

Estas via propra afero elekti ian aŭ alian opinion. Neniu rajtas elektigi iun al vi. Do vi rajtas heziti, havi nenan opinion, ĉu fariĝi naciisto, internaciisto, sennaciisto, estas via propra afero. Pli kaj pli mi opinias, ke opinioj politikaj, religiaj, ktp., estas ligitaj al la genaro de ĉiu.

Vi povas frekventi la "skinheads" aŭ aliajn novnaziojn kaj vi vidos mem, ĉu ili distingas inter naciismo kaj imperiismo. Ne estas serioza tiu afero de naciistaj unuigoj, kiuj povas ŝanĝigi ĉiutage, kiel la aliancoj antaŭe. Sennaciismo supozas kunfandiĝon de la individuoj en homaro. Sendube ne estas ankoraŭ sennaciismo, kiu estas ligita al tutmonda lingvo, ĉefe Esperanto, la lingvo de neniu por ĉiu. Sennaciismo estas celo iam atingenda.

Kial portugala popolo ne fandiĝis kun la hispana popolo, tio estas perdita en la tempo, laŭ la sortŝanĝoj de la historio. Ŝajnas, ke ili estis kune ĝis la XII-a jarcento. Tiam Portugalio estis graflando de Hispanio. Kiel ofte okazas, la tiama Grafo sukcesis akiri sendependecon. Poste, spite la diversajn konfliktojn, ili sukcesis konservi sendependecon. Fakte, Portugalio ne estas speciale riĉa, kaj la monavidaj Hispanoj preferis konkuri riĉajn koloniojn en Ameriko. Siaflanke ankaŭ Portugalio konkeris koloniojn. Se vi deziras pli da informoj pri tio, konsultu la librojn pri la historio de tiu regiono. Aliparte, ĝis la morto de Franko, en Hispanio estis abomeninda diktaturo (krom dum la respublika epoko), tio ne estis alloga. Nun kial ili deziras eniri estontan Eŭropon? Tute simple Portugalio estas nun malgranda, malriĉa lando : Brutta nacia produktado / loĝanto : 4403 US\$ jare. Francio : 16 905 \$. Federa Germanio : 19 610 \$. Ĉiuokaze, kiam Eŭropo ekzistos, la vivnivelo estos pli alta. Sed nun ni ekvidas, ke kompare la diferenco inter Francio kaj Germanio estas malgranda, sed por Portugalio la diferenco estas proks. en la proporcio 1/4. Vi vidas tuj la avantaĝon de Eŭropo por la portugalaj registaro kaj popolo.

Ĉu vi kredas, ke kiam Eŭropo ekzistos, etaj landoj kiel Slovenio, k.a... povos eniri, eliri laŭ la fantazio de tiamaĵ registaroj aŭ tiamaĵ etnistaj grupoj? Kiam mi redaktis mian artikolon, tiam estis la komenco de la milito en Jugoslavio. Nun estas miloj da mortintoj. La helpo de UNO kostos 400 000 000 US.\$ (Le Monde 15/2/92) por sendi 10 000 soldatojn. Kiu pagos? Ni ĉiuj. Ĉu tio kontentigas vin? Naciismo, ĉiuspeca, havas nenian estonton. Ĝi celas nur militon. Diskutu kun la veraj naciistoj!


La problemo estas, ke kiam Eŭropo ekzistos, verŝajne post 50 jaroj, 300 000 000 aŭ pli da migremuloj el Afriko, Sud-Ameriko, Azio, deziros eniri. Ĉar la sendependeco de tiuj landoj el la Tria Mondo tute ne profitonis al la popoloj de tiuj landoj, kiuj havas pli malaltan viv-nivelon, pli nebulan estontecon, ol dum la koloniado. Komprenoble tio ne koncernas niajn triamondistojn el la kapitalisma mondo, nek la rasistojn, nek la naciistojn. Por ili pli gravas esti sendependa en mizerego ol superregata de progresemaĵ registaroj. Ĉiu laŭ sia vidpunkto!

J. DEKER

DENOVE L' AŬTUNO

<i>lu farbis la ĉielon pale-blanka, nubojn - griza. La aŭtuno perdas belon, venis nokta frost' surpriza.</i>	<i>lam maro estis paca, nun ĝi ondas, ŝtormas, bruas, ial ne fariĝas laca kaj l' anim' kun ĝi kongruas.</i>
<i>Forta vento malamike fian malutilon kaŭzas, - en vizaĝon blovas pike kaj kolere harojn taŭzas.</i>	<i>Dense folifalo bunta kovras la malvarman teron, de betuloj flavo punta antaŭdiras vintran veron.</i>

3.X.1991. Antonina Apollo, Tallinn.



- bonne voie (être en) : stari sur bona vojo Z
- bouchée (n'en faire qu'une) : 2) sans propre : per unu gluto formanĝi
2 - fig. : per unu bateto (svingeto) finvenki
- bouillir à gros bouillons : bolegi
- bout de patience (à) : perdiinte la paciencon
- 317 : voir 3183
- 338 : voir 3721
- 340 (bruit d'enfer) - ajouter : tumulti (bruegi) kiel cento da diabloj
- 342 (brûle pourpoint) - ajouter : sen ajna preparo
- 344 (brûler à petit feu) - ajouter : rosti sur malgranda fajro B
- 365 (cadavre ambulante) - ajouter : paŝanta
ça et là 1) ie-tie, tie kaj aliloke
2) diŝe
- 370 : voir 1973
- 382 (caresser l'espoir) - ajouter : nutri la esperon Z
- 384 (carte blanche) - ajouter : havi kubutliberecon
- cas de (faire) : ŝati
- 400 (cavalier seul) - ajouter : esti senparulo
- cervelle d'oiseau (une) - voir 3358
- cesse que (n'avoir de) : ne havi ripozon ĝis ..., ne ĉesi (ekriposi) antaŭ ol ...
- cesser le feu : ĉesigi la pafadon
- 409 (en chair et en os) - après "ostoj", ajouter Z
- chanter comme une casserole : kantaĉi
- chargé comme un baudet/un mulet : ŝarĝita kiel azeno / mulo
- 419 (à charge de revanche) - ajouter : repagote
- chasse (être en) - voir : 410
- chasser deux lièvres à la fois - voir : 616
- chat (ne pas y avoir un) - il n'y a pas un chat : voir 445
- cheval de retour (un) , un récidiviste : rekulpufo
- cheval de selle (un) : selĉevalo, rajdĉevalo
- cheval de trait (un) : tirĉevalo
- chien d'arrêt (un) : haltohundo
- 454 : voir 463-898
- clair comme l'eau de roche : kristale klara
- 459 (clair comme le jour) - ajouter : il fit clair comme en plein jour
- fariĝis lume kiel en hela tago B
- 460 (claquer des dents) - ajouter : kunbati la dentojn
- 463 (en un clin d'oeil) - ajouter : en la daŭro de unu ekrigardo B - voir 454-898
- cloche pied (à) : unupiede

VINBERRIKOLTISTA ESPERANTO-MOVADO

Jam pli ol 10 aŭtunojn mi faras vinberrikolton kaj de 5 jaroj laborante kun Ana ni pli kaj pli informadas pri Esp-o dum la rikoltado. Kaj pro tio ni akceptis por kune labori eksterfranciajn E-istojn, kiuj serĉis sezonan laboron, kaj kiuj ne povas paroli nek kompreni bone la francan.

Estas vere bona okazo sciigi pri Esp-o dum vinberrikolto. Imagu, ke vinberrikoltistoj estas ĝenerale gejunuloj, kiuj ne havas multe da mono: studentoj aŭ senlaboruloj kelkfoje kiuj naskiĝis en nefrancio. Jes, kompreneble ĉiam ankaŭ kelkaj drinkemuloj estas, sed aliflanke sufiĉe internacia etoso invadas. En tia etoso laŭ nia sperto paroli pri internacia amikeco kaj pri lingvoproblemoj kaj Esperanto estas relative facila... ĉar fakte tie ja estas problemoj (ekz. pasintjare en iu farmbieno, kie ni estis, nur 1 el 12 poloj scipovis la francan kaj aliaj preskaŭ ĉiam parolis nur en la pola, kaj franclingvo-parolantoj estis malplimulto. Ni kelkfoje eniluziĝis, ĉu ni laboras en Pollando?! Kaj tiu interpretantino kelkfoje eĉ ege laciĝis pro la senĉesa interpretado. Tamen neniu polo interesiĝis pri esp-o... (Ĉu tiel malpopulara estus esp-o en Pollando?) kaj ni disdonas informilojn, kiujn ni mem faris kaj kiujn ni fotokopiis el la sliparo eldonita de SAT-Amikaro.

Kaj krome se tie estus Esp-isto el eksterfranclingvio, ni povas montri facile efikecon de Esp-o. Ni kutime laboris ĉe 3 farmobienoj dum pli ol 3 semajnoj, kaj ĉiu-loke ni povis trovi kelkajn, kiuj sufiĉe ekinteresiĝis.

...Sed daŭra interesiĝo ne ĉiam bone iras, ĉar ni ne loĝas proksime de ili post vinberrikolto. Kaj pro tio ni devus kunporti diversajn Esp.-adresarojn por trovi la plej proksiman E-iston. Sed tamen kelkfoje mankas E-istoj en iuj regionoj kaj pro tio ni preparis perkorespondan kurson. Malgraŭ tio junuloj estas kapricaj! Tamen tamen finfine nun ni faras E-korespondan kurson kun vinberrikolta Esp-komencantino el Italio.

Nu, nia celo ne estas skribi nian historion pri bravajoj!

Antaŭe ni vagante vivis ĉefe nur per tiaj sezonaj laboroj sed nuntempe ni loĝas en Cevena montaro en malnova domo kiu estis forlasita dum longa tempo: riparindaj lokoj, senrubusiĝendaj lokoj estas ĉie ajn. Por trivivi en la montaro grava afero estas efika laboro pli ol mono!

Tial ni fine decidis ke ni ne plu laboru tiom longe por vinberrikolto. Sed kiel daŭre, ke ni devus forlasi nian tradician Esp-informadon en vinberkampo, ĉu ne! Kaj do nun ni demandas al ajnaj junaj E-ist(in)oj el franclingvio (Francio, Belgio, Svisio, Kvebekio, k.a.?), ĉu iu volas labori por vinberrikolto kun eksterfranclingvia Esp-isto en la farmobieno, kie ni laboris.

Do, nia celo ne estas ekonomia solidareco kun malriĉaj landoj, ĝi estas nur informi pri Esp-o... ĉar tia persona helpo ne ŝanĝos la ekonomian problemon de tiu lando. Se oni multege helpus al iu (aŭ eĉ iuj) Esp-istoj de tia lando, ili nur fariĝus etnovriĉuloj de tiu lando. Nome, ni estos kontentaj nur se tio ankaŭ iom faciligos ŝian/lian vojaĝon tra Francio.

Aliflanke en Francio estas ankaŭ multaj senlaboruloj, en nia vilaĝo multaj junuloj estas en tiu kategorio (sed ni ne estas tiu! Ni estas senlaboraj vivantoj). Urbestro de Vilfrans ("Villefranche sur Saône", urbo, kiu situas meze de vinproduktregiono Bojolezo/"Beaujolais") diris: "Ni ne povas akcepti la tutan mizeron de la mondo." - pasintjare 2000 poloj vinberrikoltis en la kantono de Vilfrans. Oficiala tiu nombro. Kaj neoficiale kiom da poloj laboris tie! Kaj en tuta Bojolezo! Do entute kiom da polaj laboristoj estis en tuta Francio! Por la franca senlaborularo certe malfaciliĝis trovi laboron por vinberrikolto. Tio okazis ĉar ekde pasintjare poloj rajtas labori en Francio kondiĉe ke dunganto pagu socian sekuron ktp. por ili.

Tial ni serĉas unue franclingvanon, kiu volas labori anstataŭ ni. La laboro estas dum 8h 30mn ĉiutage, kaj tio daŭras ĉ. 10 tagojn. Mango estas ne por vegetaranoj. Kvankam malofte okazas foriro de laborist(in)oj pro la severeco de laborkondiĉoj aŭ mensaj kondiĉoj, tamen ne tro timu, eĉ studentinoj laboras. Tamen ni ne tro rekomendas al kiu abomenas vinon.

Kaj do laŭeble frue kontaktigu al ni! Ĉar ni povas rekomendi nur 1 farmodomon. Kaj poste ni devos trovi Esp-ist(in)on (eble el Pollando, ĉu?), kiu n e scipovas la francan, kvankam tio supozeble estos tro facila. Sekve ni atendas nian bonŝancon kiel kutime. Kaj do ci skribu jenen :

Ana k Ljo, esperanto, Lafigère,
F 07140 MALARCE, Francio

Jus aperis : Okada Haru. **Notoj pri la Delto.** Tradukis Konisi Gaku. 90-paĝa broŝuro eldonita de Japana Esperanta Librokooperativo. Toyonaka-si, Sone-higasimati 1-11-46-204 561 JAPANIO.

En esperanta vesto jam aperis relative multaj dokumentoj kaj atestaĵoj pri la atombombado al Hiroŝimo kaj Nagasako, 1945. Sed tiu ĵus eldonita ne superfluas.

Malkovrita kaj aperinta en Japanio en 1991, ĝi estis tuj tradukita kaj eldonita, kaj jen specimeno, diligente sendita de nia laŭtula amiko Mine Yositaka, trafas la Laŭtejon. La eksterordinara travivaĵo de la verkintino - kiu tiam troviĝis je nur 1,2 km for de la eksplodcentro kaj mirakle elsaviĝis - kaj ŝia elstara priskrib-talento vere indas tiun belaspektan, ilustritan kaj trafte tradukitan eldonon.

"...Tiam 38-jara, ŝi posedis harditajn artistajn okulojn. La priskriboj, liberaj de momenta pasio, kaptas la kruelajn okazaĵojn tre objektive kiel per televida kamerao..." Tio estas iom el la komento troviĝanta fine de la broŝuro. Kaj mi povas atesti, ke ĝi ne troigas.

Nepre akirenda, leg-enda... kaj cirkulenda. Kribo

En tiu ĉi nekutime maldika numero povis trovi lokon ne ĉiuj ricevitaj artikoloj, i.a. tekstoj de S. Boniol, Gbeglo Koffi, Ergoto de Bonaero, Jacques Caubel, Deker...kiuj bonvolu indulgi.. kaj pacienci ĝis la venonta numero....

— fine de majo —